

I-a jaro - N° 7

Junio 1942

HISTORIO PRI LA EKESTO, KRUSKADE KAJ FLORADO DE NIA ESPERANTO-GRUPO
"PACO KAJ JUSTECO"

(3-a daŭrigo)

"La deca kaj jubilea kongreso suĉesis je ĉiuj vidpunktoj. Sed ne pensu ke kongreso nur estas eterna parolado; vere ne, ankaŭ amuzigan flankon ĝi havas, kaj por tiu parto Antverpeno certe estas la revita urbo.

Kvankam mi ne promenis okulfermite en Antverpeno, tamen mi ne bone scias proskribi ĝin. Mi do lasas paroli iun alian, kiu certe scipovas ĝin pli boni ol mi:

Tiel:

Tre larĝaj aleoj	viroj tre spritaj	de ŝipoj kaj grupoj
kinejoj, muzeoj,	kaj kosmopolitaj,	infero de bruoj.
statuoj kaj placoj	bieroj kaj vinoj	Urbeg' de laboro
teatropalacoj,	kaj belaj virinoj.	en plena vivgloro,
hoteloj, bulvaroj,	Kajmuroj senfinaj,	miksaĵ' de gotiko
strataĉoj, mansardoj,	renkadoj maŝinaj	kaj novestetiko
Parkegoj freŝombraj,	fajfad' de sirenoj,	tutmonda haveno,
kafejoj sennombraj,	grincantaj katenoj	jen, Grand-Antverpeno.

(F.V. Dorno)

En la akceptejoj ni estas bonvenigataj per amika rideto kaj koraj salutoj. Estas agrable povi rigardi ĉiujn kiel amikoj.

La formaĵoj estas tuj plenumitaj kaj kun la necesaj dokumentoj ni ekserĉas nian loĝejon. Ni estis petantaj loĝigi nin en la sama hotelo sed nia peto ne estis plenumita.

La plejgrandparto el ni revenas longvizaĝe kaj la kuraĝon en la ŝuoj. Cu kauze?... malmola lito kaj eĉ al nia kasistino ne plaĉis la vestportilo.

Ni renkontas nun nian sekretarion kiu venis bicikle kaj dum la intima vespermanĝo inter gesamgrupanoj la gajeco regas.

Atendas ni la interkanotige festo en la "Chatelet". La kongresantoj tie estas bonvenigataj per agrabla parolado. La teatraĵo kiu sekvas nur havas unu efikon... de tempo al tempo oni vidas manon ekkovrante tro malfermitan buŝon.

Poste balo, dum kiu la interkonatiga danco precipe akiras aplaudon. Ĉiu havas ĝojon en la koro kaj ridon sur la lipoj. La tempo forflugas; iĝas la unua postnoktmeze kaj nu foriras al niaj loĝejoj. Kia nokto... Ni sur la kvara etaĝo kaj unu etaĝo pli alte Angloj, kiuj loĝas litere sub la tagmentejo. Nu tiuj (mi volas diri la Angloj) dum unu horo bruigas kaj kantadas tiel ke mi pri dormado eĉ ne povas pensi. Kaj kiam ili finfine silentas, mi aŭdas des pli bone la tramveturilojn, aŭtomobilojn, kaj aliajn bruigantajn ilojn, kiuj min, kiel kutimas la bruĝajn pacajn noktojn, tro pckadas miajn nervojn kaj malhelpas min ekdormi...

La lumigo de l'aŭroro finigas miajn suferojn. Je la nata Dro pastro DE COEN predikas esperante dum la Sta Meso. Sendube li estas pasia esperantisto kaj ankaŭ li parolas tre bone kaj flue. Poste samideanino el Eindhoven (korespondantino de nia sekretario) alvenas kaj kune daŭrigas la promenadon. Post fotografado antaŭ la Rubens-statuo, ni supreniras la turan de Nia Sinjorina preĝejo.

Ni ĝuas la belan panoramon de la Skeldo-rivero kiu en larĝaj kurboj malrapode fluas al la maro. Kiam ni post multaj interpuŝadoj sur la mallarĝa turstupaĵeto venas malsupre, nu vidas ke la kongresantoj kuniĝas antaŭ la urbdomo.

Intertempe la gereprezentantoj de la bela Bruĝo, ĉirkaŭ ilia malfaldita flago, portata de Leo Bruggeman, lasas ilin fotografi antaŭ la ĉiam akvoĵetata Brabo. Parolante de nia flago ni devas diri ke el la partoprenantaj la nia estas la plej bela tiel ke ĝi estas farita pure laŭ la animo de kreinto de l'Esperanto Lingvo. Al aliaj ankoraŭ pendas politikaj koloroj, aŭ aliaj distingaj signaĵoj, sed nia flago ne havas tiajn fantaziaĵojn; ne, ĝi brilas de simpleco. Esperanto ja konas nek koloron nek naciecon: Esperanto ne povas kuniri kun politiko, je mala okazo ĉar nia grupa.

levizo laŭtas: "Paco kaj Justeco !"

Eniro la urbdomon. Ni estas bonvenigataj kaj kelkaj alparoladoj okazas. Mi staras en la malantaŭa parto de la salono kaj nur povas vidi parton de S-ro FRENS-BEN, nome liajn mentonharojn. Mi atendiĝas ĉiunmomente ekvidi prezentadon de ŝnur-kaltarto, sed ĉio daŭrigas normala. Kiam miaj oreloj ekzumiĝas pro multaj belaj portoj, ni estas kondukataj tra la salonoj, kiuj estas tre luksaj. Precipe la ed-
viga salono estas bele ornamita; oni vere dezirus edziĝi kiam oni vidas tian luksa-
jon, estu nur por la salono.

Post tiu oficiala akceptado ni procesie promenas en la stratoj kaj finas la kondiĉado per fotografado de ĉiuj gekongresantoj sur la ŝtuparo de la Flandra Teatro. Estas jam la dua, sentiĝas la malsatago kaj ni foriras al la bankedejo.

(daŭrigota - skribis por la revuo R. I.)

~~~~~

SKRIBTALENTOJ DE NIAJ GEMEMBROJ - ("Niaj gemembroj rakontas" aŭ "Libera  
Tribuno" - rubrikoj)

Unu el la plej belaj manifestiĝoj de l'mezepoko estas sur literatura tereno, la kavalirromanoj. Ili estas rakontoj pri noblaj kavaliroj kiuj batalis por sank-  
taj aferoj kaj defendis, eĉ en multaj danĝeroj, la jus-tan kaŭzon de malfortuloj. La necesajn forton kaj kuraĝon por plenumi tiujn taskojn ili trovis en la estimo de iu nobela fraŭlino kiun ili klopodas gajni. Tiel ekstis iu virinkulto tre pura, altmorala, ideala.

Post kelkaj jardekoj tiu literaturo degeneriĝis. Envenis burleskaĵoj. Oni eltrovis plej fantastastajn aventurojn. Gis fine tiuj romanoj iĝis tute mokridia-  
daj. Ankaŭ multajnmaldecaĵojn oni skribis. Venis, kompreneble, kontraŭagado. Precipe inter la ekleziularo kiu forte predikis kontraŭ tiuj pomanoj.

Sed nenio helpis. La homoj ŝatis tiun literaturon kaj abunde legis ĝin. Tiam iu verkisto skribis parodion de la kavalirromanoj. Tiel majstre li skribis kaj tiel okulfrape li lapablis montri la stultecon de ili ke riuj libroj nu renkontis ĝene-  
ralan malplaĉon. Kaj tiel, per unu grande forstreko, Miguel de Cervantes Saavedra kapablis forbalai la amason de malindaj kavalirromanoj. Lia heroo "Don Kiĥot de la Manĉa" estas viro kiu legis preskaŭ ĉiujn kavalirromanojn kaj trovis ilin la plej serioza afero en la mondo. La rezulto estis ke li freneriĝas kaj imagas ke li es-  
tas same kavaliro kaj ke li same devas plenumi grandan taskon en la mondo.

Ci-sube sekvas malgranda parto el tiu libro :

"Dum nia brilnova kavaliro tiel laŭiris sian vojon, parolis li al si men tia-  
maniere: sen iu dubo la scienculo kiu rakontos en la esatontot la tre veran his-  
torion de miaj keroaĵoj, kiam li komencos priskribi tiun-ĉi mian unuan eliradon,  
komencos li sian rakontadon laŭ sekvanta maniero: "Apenaŭ la arda Apollo diseten-  
digis la orajn fadenojn de sia bela hararo super la tero, kaj apenaŭ la multkolo-  
raj birdetoj per siaj harpolangetoj en mioldolĉa, fluanta melodio salutis la al-  
venon de la rozkolora Aŭrora kiu, forlasante la dolĉan liton de ŝia ĵaluza edzo,  
montris sin super la pordegoj de la Manĉa-horizonto al al mortuloj, ke la fama ka-  
valiro Don Kiĥot de la Manĉa, elirante sian malvigligan liton, saltis sur sia fama  
ĉevalo Rosinante kaj komencis sian vojon tra la malnova kaj konata ebenaĵo  
de Montiel" (tiel efektive estis nomata la vojo sur kiu li iris nun). Kaj li al-  
lonis: "feliĉa tago kaj feliĉa jarcento kiam miaj famegaj faroj aperos en la lumo,  
indaj por esti skulptataj en bronzo, martelataj en marmoro, kaj pentrataj sur tolaĵoj  
je rememoro por la postgenracioj. Ho vi, saĝa sorĉisto kiu ajn estos vi kiu estos  
vi kiu estos ŝarĝata per tiu tasko priskribi tiun eksterordinaran historion, mi  
petegas vin: ne forgesu mian bonan Rosinante, mian nesepareblan akompananton en  
ĉiuj vojaĝoj kaj iradoj". Poste li pluparolis kvazaŭ li vere kaj tute enamiĝis:  
"ho princino Dulĉinea estrino de tiu-ĉi mallibera kor grandan maljustaĵon vi faris  
al mi eksilante min kaj ordonante ke mi ne povas aperi antaŭ via beleco. Plaĉu al vi,  
nobela fraŭlino, pensi pri tiu-ĉi la al vi submetita koro kiu, kaŭze de ĝia amo al  
vi sugeras tiom da zorgoj". Al tiuj stultaĵoj li aldonis aliajn similantajn al tiuj  
li lernis en siaj libroj, kiel eble plej imitante ilian parolmanieron. Intertempe  
li trairis tiom longan vojon kaj la suno tiel rapide kaj tiel forte altleviĝis ke  
tio sufiĉus por komplete sekigi liajn cerbojn, en la supozo ke li ankoraŭ havis  
cerbojn ! En la daŭro de la tuta tago li bramigis sen renkonti iom rimarkindan.  
Pro tio li preskaŭ malesperiĝis ĉar li deziregis renkonti tuj ion sekve de kio li  
povus provi la forton de siaj sentimaj brakoj."

(skribis por la revuo Drs. Fernand Roose)

X-X-X-X-X-X-X-X-X



LITERATURA ANGULO : 1° - Prozo.

La genestroj de "Paco kaj Justeco" en serioza kunlaborado dum la ĉiusemajnaj kurvenoj komencis la 1°-tradukadon de la bela verketo de nia konata flandra aŭtoro P. Timmermans "De zeer schoone uurtjes van Juffrouw Symfrosa, Begynstje". La estraro decidis aperigi tiun tradukaĉon en nia revueto sub la rubriko "Prozo" de la "Literatura angulo".

LA TRE BELAJ HOROJ DE FRAŬLINO SIMFOROSA, BEGINEJO.

LA VINBERUJO :

Aero estas pluva -argenta kiel dorso de fiŝo. Je tiuj tagoj estas belaj nuboj de aspektoj kaj koloroj diversspecaj, kaj dum ke tie-ĉi la suno glitigas fingron da lumo tra la vitro, tie super la kampoj pendas peco da hela ĉielarko.

Jen la tempo por prelatori la ĝardenon. Beginejo Simforosa venigis ĝardeniston Martinus, nevon de S-ro la subpastro, al sia ĝardeneto, por altigi legombedojn, planti florojn kaj tondi la belan vinberujon. Li venis vestita per siaj ruĝa trikotveŝto kaj blua antaŭtuko, kaj dum li pensas ridas liaj okuloj al al farita laboro. Simforosa, kun sia pinta nazeto, rigardas al ĝi; ŝi trikas blankan ŝtrumpo kaj ekscese babilas pri la vinberujo.

Liel aĝa kiel la strato estas la vinberujo; tendena kaj nodeca; ĝi rekte supren rampas inter la postporlo kaj la fenestro ĝis la paserneŝto kie ĝi subite disventumilas trans la tuta bruna, malsaketa muro. Sed ĝia animo estas juna kaj ekstreme sentema. Kiam ĝi flaras la printempon ĝi tuj elburĝoniĝas, kaj dum oktobro ĝi ornamas sin per la plej belaj blankaj vinberoj de ĉie en la ĉirkaŭejo.

Martinus ridas je unu buŝflanko kaj ne bone scias kion diri en ĉeesto de virinoj. Estas la unua fojo ke li laboras ĉe fraŭlino Simforosa. Nur depost kelkaj monatoj li laĝas en la Beginejo. Antaŭ li estis ĝardenisto en la kastelo apud Turnhout. Lia onklo, subpastro, opiniis ne konsilinda ke dudekkvinjara junulo kelkfoje longtempe estis sola kun la kastelservistinoj ... Kaj venigis lin al beginejo. Martinus laboras nun por si mem, facile laborenspezas kaj loĝas sola en domo de l'Inferstrateto, malantaŭ la farbarilo.

Simforosa fieras vidi tian lertan laboriston en sia ĝardeneto; ŝi havas agrablan senton en lia ĉeesto... kaj prokrastas preĝojn ĝis vespero. Si vidas lin bela junulo kvankam la brakoj estas iom longaj. Kia vizaĝo radias kaj rozkoloras; larĝa estas la suba parto. Ĝi posedas du helajn, bonecajn okulojn de fidela ĥundo ĉiam ridsimilajn, mallarĝan buŝon kun dikaj, ruĝaj lipoj ŝmacantaj kvazaŭ li ĵus manĝis bonegan lardon.

(tradukis: la 1°-grupo "Paco kaj Justeco")

2° - Poesio

M I A V I V O .

Mia vivo  
ŝajnas drivo  
sur senfina mar',  
Forpelata,  
Turmentata  
Ĉiam de l'ondar' .

Mia sorto  
estos morto  
post la vivbatal',  
Ripozado  
en la tombo  
jen, mia fatal'.

Cu fatalo ?  
Mortovalo  
ne timigas min  
Post la marto  
Dia korto  
feliĉigos min.

(J.H.W. Doorneveld)

Paĝo de la serioza laboro: a/ Angulo de la serĉemuloj:

Nova konkurso - Krucvortenigmo (konkurso N° 9)

|   |   |   |   |   |   |   |   |   |    |    |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|----|----|
| 1 | 2 | 3 | 4 | 5 | 6 | 7 | 8 | 9 | 10 | 11 |
|   |   |   | X |   |   |   | X |   |    |    |
|   |   |   |   |   | X |   |   |   |    |    |
|   |   | X |   |   |   |   |   | X |    |    |
|   | X |   |   | X |   |   |   |   | X  |    |
| X |   |   |   | X |   |   |   |   |    | X  |
|   | X |   |   | X |   | X |   |   | X  |    |
|   |   | X |   |   |   |   |   | X |    |    |
|   |   |   |   | X |   |   |   |   |    |    |
|   |   |   | X |   |   |   | X |   |    |    |

- HORIZONTALE: 1. kruela (R) - korelativo de pers. - parto de konstruaĵo. 2. maŝine meti literojn sur papero frandaĵo (R)
3. prefikso - diino (R) - pers.pron - 4. pers.pron. - metalo (R) 5. trinkilo birdo (R) 6. ekkrio - membro (R) 7. persceno (R) indiĝeno de Ned.Hindujo (R) konjunktio 8. manĝebla herbaĵo (R) - sezono (R) 9. infane- virino- instrumento.
- VERTIKALE: 1. sovaĝa porko- ĉina ŝarĝportisto (R) 2. superhuma ago (R) - prilaborita bestfelo (R) 3. prefikso- produkto de la ŝafo (R) - prefikso 4. Europa lando 5. korelativo de loko- ŝategi 6. pers.pron. - familiano (R) 7. numeralo- ludkarto 8. enloĝanto de Nordamerika lando 9. fari (R) amfibio (R) pers.pron. 10. purigi (R) subtera ĉambro (R) 11. birdo (R) - romana imperiestro.

Rimarko: la vortoj kun (R) signifas radikvortoj.

Solvo de la konkurso N° 7: (punktenigmo): ŝtern' - arako - fazan' - ovala - dazip' okupu - Niniv' - avara - Sarah' - salmo - ikter' - akant' - neces' - lerta - Arnem' nenia - oriol' - nokte - pedik' - ojstr'.

La proverbo estas: "Ŝafo donas sian lanon por ke la mastro havu panon".

Post la konkurso n° 7 la poentranlisto estas jena: Denis Maly 59 $\frac{1}{2}$  - Gr. Maertens 57 R. Martens 48 - B. Verleye 46 $\frac{1}{2}$  - H. De Kersgieter 25 - F. Roose 24 $\frac{1}{2}$  - F. Nono 22 $\frac{1}{2}$  - M. Vanden Broele 17. - Da membroj atingis la 50 p. kaj sekve gajnis libroprenion. Kiu sekvos ?

Rimarko: ĉio rilate tiu rubriko oni sendu al ISERENTANT R. Komvest 70 Brugge.

b/ studadanguleto

DE ZIN

De zin is altijd een mededeeling, een vraag of een gebod: vb. ik kom; hij blijft, komt gij? ik zal blijven. Kom! blijft!

Daaruit bloeit voort: van zochast men een der bovenstaanden heeft, heeft men reeds een zin, die op zichzelf volledig is. Als we die zinnen ontleden treffen we daar steeds in aan: 1) een onderwerp, die de handeling moet stellen 't zij dit onderwerp duidelijk gesteld is zoal in het eerste voorbeeld, 't zij dit onderwerp onderwerstaan is zoals in de twee laatste voorbeelden. 2) een gezegde t.t.z. hetgeen gezegd wordt van het onderwerp. Nu zult u opmerken dat de zinnen gewoonlijk veel langer zijn. Inderdaad. Welnu al hetgeen daarbij komt zijn bepalingen. Vb. ik schreef" is een mededeeling, dus een zin. "een brief" is een nadere bepaling van wat ik schreef. Ik had immers zoowel andere dingen kunnen schrijven. "naar een vriend" is nog een nadere bepaling van die zin. Eveneens; "den 12den maart" en "in Nederlandsch Indie". Bemerkt echter! Moest er voor een brief bv. nog staan "een lange, leuke" dan zou dat geen nieuwe bepaling zijn in de zin, doch alleen maar een bepaling van de brief nml. hoe de brief is. Evenzoo: moest er bij "naar een vriend" staan: "naar een zeer goede vriend" dan is dat nog geen nieuwe bepaling in de zin, doch wel een bepaling van vriend, nml. welke vriend het is. Dus moeten wij de zin zóó indeelen: ik schreef/den twaalfden Maart/ een lange, leuke brief/uit Brugge/ naar een zeer goede vriend/ in Nederlandsch Indië/. Hier hebben wij dus een zin, bestaande uit één onderwerp, één gezegde en vijf bepalingen.

Vermits een onderwerp en een gezegde reeds een zin uitmaken, zullen we telkens met een nieuwe zin te doen hebben, ieder keer dat een nieuw onderwerp en gezegde optreden. vb.: toen ik binnen kwam was mijn vader op het punt te vertrekken. Hier staan twee zinnen aan één gebonden. U heeft reeds bemerkt dat in de voorgaande zinnen telkens een werkwoord is. Nochtans kunnen niet alle werkwoorden dienen voor gezegde nml. het werkwoord "zijn" en de met "zijn" gelijkgestelde werkwoorden, zooals "worden" en de werkwoorden die beteekenen "verkeeren in een toestand" vb. "wij worden" en "hij is" worden niet beschouwd als mededeelingen, zijn dus geen zinnen. Er moet nog een gezegde bijkomen.vb. "hij is groot" "wij worden sterk" "hij blijft lui" (het werkwoord "blijven" heeft twee beteekenissen).

Let nu goed op! We hebben laatst uiteengezet wat een voorzetsel is. Welnu: iedere keer dat een bepaling in een zin optreedt, zonder voorzetsel, staat het zelfstandig naamwoord en het bijvoeglijk naamwoord in den accusatief. Anders niet.

Dus: Mi skribis/la dudekan Marton/longan, gajan, lateron/ el Bruĝo/ al tre bona amiko/ en Nederlanda-Hindujo/

Nota: het is niet noodzakelijk dat onderwerp en gezegde vooraan staan in de zin

OEFENINGEN: vertaal, scheid de zinnen en de bepalingen, noteer de onderwerpen :

Op het laatst van verleden jaar, vierden wij in de stedelijke schouwburg het tienjarig bestaan van de plaatselijke tooneelkring met een speciale opvoering van het drama "Het bloedig halffrankske" en de klucht "Het geheim der bakkerskar of zeven jaar later". De jubileerende hoofdvertolker was zoo bedreven dat hij meerdere dames uit het publiek opvolgentlijk deed huilen tijdens het drama en dan ziek worden van 't lachen tijdens de klucht. Zelfs de statige dame van onzen burgervader, die het altijd beneden haar waardigheid acht in het openbaar haar gevoelens te uiten, kon zich niet weerhouden. Zij voelde zich daarna diep gekrenkt. Onder invloed van die gekompliceerde emoties kreeg zij ettelijke zenuwtoevallen en - buien die allemaal op het hoogd van haar arme echtgenoot neerkwamen, van wie we overigens bezwaarlijk kunnen zeggen dat hij burgemeester is, vermits zij veeleer burgemeesteresse is.

Bemerking: ik verwacht inzendingen van alle leden voor het verschijnen van volgend nummer.

(verzorgd door Drs. F. Roose)



GRUPA VIVADO: a/ de la monato Majo

ekskurso de la 4/5/42: okaze de la Sta Sangotago en Bruĝo multaj de niaj gemembroj havis libertempon kaj la estraro decidis organizi promenadon al kaj ludadon sur tereno de "Ryckevelde". Kvankam vetero iom estis venta kaj ne tro varma tamen grandnombre la gesamideanoj partoprenis, kaj bonege amuziĝis. Pli da detaloj mankas ĉar la estraro ne ricevis raporton.

kunveno de la 7/5/42: ĉar estis kvazaŭ somera vetero ni kunvenis sur la korto de nia ejo anstataŭ en la salono. Ni estis tre malmultnombre pro kaŭzo nekonata. Sekve la prezidanto decidis ne daŭrigi la tradukadon de "Simforosa" dum tiu kunveno. Por ekzerci en la parolado de la lingvo Esperanto ni faris la konatan "portretludo"-n.

ekskurso de la 14/5/42: Jaŭdo la 14/5/42 estis ĉielirtago kaj ni evidente ne tenis laborkunveno. Posttagmeze ni faris piedekskurson kaj ankaŭ iomete ludis kun pilko sur libera tereno en la ĉirkaŭaĵo de Bruĝo. Nur je la depa verspere ni decidis hejmeniri. Senscepte ĉiuj gepartoprenintoj estis kontentaj de la pasigita posttagmezo.

kunveno de la 21/5/42: tiu kunveno estis rezervita al samideano F. Norro kiu paroladis pri "Tot een dieper inzicht in het muzikaal genot". Tre interesa parolado. Ni tutspeciale menciis ke nia honora membro S-ro D-ro Remouchamps honoris tiunparoladon per lia ĉeesto.

kunveno de la 28/5/42: ankaŭ dediĉita al parolado. Amiko G. Maertens pritraktis la temon "De huidige staat van Esperanto". Ĉu necesas diri ke li rikoltis justan aplaudon ?

Dimanĉo la 31/5/42: tiu tago kompreneble okazis nia kutima monata festeto. Ni ne bezonas multe skribi pri tiu okazintaĵo ĉar kiel ĉiam ĝi plensukcesis kaj estis plensatita de la gemembroj.

b/ por la monato Junio :

Jaŭdo la 11/6/42 : estas ĝis nun nur la unua programpunkto fiksita. Je tiu dato okazos paroladvesperon de nia prezidanto. Li pritraktos la temon: "La protestantismo" laŭ nura historia vidpunkto. Ni instigasla geanon multnombre ĉeesti ĉar parolado de amilo F. Roose ĉiam estas interesa.

Pliaprogramo por monato Junio: rilate la aliaj datoj de kunvenoj kaj ekskursoj oni entempe avertos la gemembraron. Kompreneble la semajnaj kunvenoj daŭrigas kiel kutime.

ZIEER BELANGRIJK

Esperantisten ! Wanneer U aankopen hoeft te doen denkt dan in de eerste plaats aan de leden der groep of aan diegenen die met ons ideaal sympathiseeren, zoo het gewenschte bij een van hen is te verkrijgen.

Esperantisten ! Steunt vooral dezen die ook ons voordeelen verschaffen. Noteer goed - voor eventuele gelegenheid - de volgende adressen:

A. DENYS - Gieterijstraat 23, te Brugge: bij aankoop van foromateriaal of werk van ontwikkelen, afdrucken e.d. genieten onze leden een korting van 8 %

Boekhandel "UNICUM" - Langerij te Brugge: staat een korting toe aan onze leden van 10 % bij elke boekenaankoop.

G. MAERTENS - Nieuwstraat 54, te Assebroek: de leden worden verzocht persoonlijk eens bij onzen ijverigen propagandaleider aan te kloppen om van hem zelf alle gewenschte uitleg nopens het zich aanschaffen van nuttig en goedkoop propogandamateriaal te ontvangen.

-----  
KIEL ONI ĜIN ESPRIMAS EN ESPERANTO ?

- Matena horo estas plena de oro -(de morgenstond heeft goud in de mond)
- Post alkutimiĝo doloras disiĝo -(scheiden doet lijden)
- Akvo kura, akvo puro (of ook) - Laboro fortigas, ripozo putrigas (of ook) eĉ ŝtono verdiĝas, se ĝi longe ne moviĝas - (rust roest)
- Oni metis makulon en mian kalkulon - (dat is een streep door mijn tekening)